

Redakta noto

Universala Kongreso de Esperanto, en tiu ĉi jaro okazinta kiel la 88-a UK en Gotenburgo/Svedujo ekde la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 2003, estas la sola eblo iom pli proksime renkontiĝi kun ISAEanoj – antaŭ ĉio dum ISAE-jarkunveno. Tio estas diferenco inter nia plurfaka asocio kaj aliaj organizaĵoj konsistantaj el fakuloj de ununura fakkampo, kiel ekz. la medicinistoj – kiuj ankaŭ ekster la UK aranĝas siajn kunvenojn kaj manifestas sian fakunuecon.

La ĉi-jaran laŭstatutan jarkunvenon de ISAE vizitis kvindekda intereso pri sciencaj aferoj. Precipa temo (post la raporto de la prezidanto pri pasintjaraj asociaj aktivadoj) estis, ke en la sekvonta jaro ni rerigardos al la ekapero de scienca revuo antaŭ cent jaroj (en 1904) kaj la centjariĝo de ISAE mem en 2006/2007.

Estis ankaŭ oportuna ŝanco, pridiskuti kun la ĉeestantoj la kongresforuman temon "Kiel scienco helpu nin, kiel ni helpu la sciencan". Dum multaj de mi vizititaj kunvenoj mi ĉiam sentis, ke ĉe tiu temo oni preskaŭ nekaŝe parolas pri la superrego de la angla lingvo en la scienco kaj elturniĝas per raportoj pri la propraj porsciencaj kaj poresperantaj laborkvantoj kaj laborsukcesoj anstataŭ resti ĉe la temo mem.

Nia propra argumentado ne estu kontraŭ iu ajn nacilingva superrego – sed ni simple referencu al la nova valuto en Eŭropo, la "mona eŭro", kies moneroj unuflanke fiere portas la nacian emblemon kaj aliflanke la eŭrop-komunan konscion – esprimitan sur la monbiletoj per pontoj inter la nacioj. Same devus aspekti la "lingva eŭro" – unuflanke fiero nacia lingvo, aliflanke komuna Eŭropo-lingvo. Ke tio en la nuntempo estas angla/germana, angla/franca, angla/itala, angla/nederlanda ktp. estas fakto. Sed kiam Britio envenos la Eŭropan Union, nek ties mona eŭro povas aspekti unuflanke eŭro, aliflanke pundo sterlinga, nek rajtas aspekti ties "lingva eŭro" unuflanke angla kaj aliflanke denove anglalingva. Dufoje la samon por iu ajn membroŝtato estas grava **eraro en la sistemo**. Ne multe helpas, akuzi la anglan lingvon. Sed eble helpas, forte kulpigi la **mankon de klarvida subteno de komuna, egalrajta, unueciga sistemo** inter la eŭropaj landoj survoje al vera mona kaj lingva komuneco. Estas urĝa tempo reveni al la ideoj de Komenio pri lingvo neŭtrala!

Profesoro *Bociort*, kiu ne partoprenis la Gotenburgan UK, tamen donas al sia artikolo la sciencforuman titolon kaj filozofie el propraj spertoj provas vekskui niajn esperantlingvajn ĉefinstancojn. Ĝuu la legadon de tiu ĉi artikolo kaj de la aliaj kontribuoj en tiu ĉi lasta kajero de la SR-jarkolekto 2003. Kore salutas *Prof. Dr. R. Sachs*, prezidanto de ISAE

Kiel scienco helpu nin, kiel ni helpu al la scienco?

Ignat F. BOCIORT

Enkonduko

La nunaj debatoj devas alporti seriozajn ŝanĝojn en la situacio de Universala Esperanto-Asocio; ni pretas aktive partopreni tiujn ŝanĝojn kaj aldoni novan, praktikan, strategian aspekton al nia nuna scienca esploro, por ke ĝi ne restu nur en teoriaj sferoj, sed pli forte turnu sian vizaĝon al la spontana movado por internacia lingvo. Ne multe antaŭenigas la movadon spekulativi pri "fina venko" aŭ simple kaj sensolve timi obstaklojn – novajn kaj malnovajn – sur nia vojo. Precipe merkantilismaj konceptoj kaj sinistraj Kasandroj devojigas la homajn fortojn al pesimismo kaj defetismo. Nu, kun malkuraĝa rajdanto eĉ ĉevalo ne bone kuras. Esperanto, kiel larĝsignifa iniciato, bezonas klarvidon, kuraĝon, optimismon, iniciatemon – kaj **entuziasmon**. Tiuspecaj iniciatoj neniam naĝis en financaj riĉaĵoj; ili ankaŭ ne bezonis aĉeti homojn, ĉar aktivaj, grandanimaj karakteroj devote engaĝiĝas por idealoj. Ni ĉiuj scias tion el la ĝenerala historio, kaj el nia propra.

Esperanto helpas al la scienco, se ĝi unue helpas **al si mem** – per forigo de skeptikismo, senfara babilado kaj de konfuzaj, senfinaj diskutoj. La anoj de ISAE pretas kontribui al **kreado de internacilingva kulturo, sen kontraŭstari al iu ajn nacia lingvo** – same kiel la postrenesancaj sciencistoj daŭre pliriĉigis la nacilingvajn kulturojn sen kontraŭstari la latinan lingvon. Ni pretas efektive helpi per tiom da validaj ideoj kiom eblaj, kaj apogi la nunan komitaton de gvidaj internacilingvaj instancoj.

Por ni, la Esperanto-movado estas kaj devas resti unusola, ĝi estas **unueco en diverseco**. Bonvenas ĉiu kreiva agado. Male, la kvereladoj, nekunlaboremo kaj malkonkordoj damaĝas nian aferon, kion jam en 1912 klare vidis *Zamenhof*. La anoj de ISAE ne partoprenas, ne ŝatas, kaj ne akceptas movadajn kverelojn. Ni postulas helpon je mobilizado de nia agema kaj fidela intelektularo, kaj pretas elpaŝi al senpera organizado de nia laboro. Nia opinie ĉiuj strukturoj de la movado devas **serĉi novajn kaj entuziasmajn gejunulojn**. Tiaj

homoj venas kaj venos al organizaĵo, kondiĉe ke ĝi **laboras en alt-spirita etoso**, ĉar, diras popola proverbo, sur seka branĉo ne kantas najtingalo. Diversaj nuntempaj bonfaraj fondaĵoj, politikaj aŭ religiaj organizaĵoj ktp montras, ke la socio daŭre naskas sindoneman homan genron bezonatan por ŝanĝoj, kongruantaj kun ĉiam pli altaj celoj.

Sub la nunaj konfuzoj en Esperantujo neniuj sciencoj povas strategie multe efiki

En la moderna socio la scienco povas fari multe, ĉar ĝi raciigas la agadojn politikajn kaj kulturajn sen ridindigi. La sciencistoj ofte havas opini-gvidantan rolon, ĉar nek politikistoj nek amasmedioj povas longe neglekti la opiniojn de la scienco. La intelektularo, la junularo, la popolamasoj fidas al sciencistoj. Oni aŭskultas iliajn prelegojn kaj paroladojn, oni legas iliajn librojn, oni eĉ timas la prestiĝon de sciencistoj. Ili ne povas esti "stranguloj", ili rigore argumentas en plurfaka perspektivo, ili estas spertuloj en parolado kaj verkado, alivorte ili regas la plej malfacilan kaj gravan akiraĵon de la homa civilizo, nome la **informon**. Aldoneblas, ke la sciencistoj, la esploristoj ĝenerale, jam edukitaj dum longjaraj laboroj en la spirito de la vero, sentas profesion respondecon por la destino de novaj kaj pravaj ideoj. La etiko de la scienco ne povas kongrui kun malkuraĝo kaj mensogoj. Tial ankaŭ Esperanto multe profitis de scienca engaĝiĝo. (Oni samtempe tamen ne forgesu, ke sciencistoj neinformitaj, koruptitaj aŭ timigitaj povis ankaŭ damaĝi la movadon!)

Ne necesas memori ĉi tie kion la sciencistoj faris por Esperanto jam ekde la epoko de *Zamenhof* ĝis hodiaŭ. Feliĉe la movado havas nuntempe tre multajn kaj seriozajn sciencistojn, kiuj agadas en ISAE, en AIS, en la Akademio de Esperanto, en kelkaj fakaj asocioj, ankaŭ en Societo pri Interlingvistiko, kiu ne estas principe Esperantista, sed tamen grave efikas ankaŭ en Esperantujo. Ni estu dankaj al niaj sciencistoj kaj al la organizantoj de iliaj agadoj, ĉar tiuj agadoj konsciigas en la socio la problemon de la lingva situacio, pliriĉigas la Esperanto-kulturon kaj havas ankaŭ strategiajn komponantojn.

La demando en Strategia Forumo restas, kiel **mobilizi** nian gravan sciencon potencialon **al dua agadformo** (paralela kun la scienca esploro), nome al **multe pli larĝa kontakto kun la cetera mondo**, kun la ekstermovada sciencistaro, kun la intelektularo, junularo, amasmedioj kaj similaj. Antaŭ ol esprimi opiniojn ĉi rilate, bonvolu permesi

kritikan rimarkon pri la neakceptebla atmosfero en la organiza vivo de la movado, ĉar la plej bonaj ideoj kaj agoj en iu sfero ne multe helpas, se alia sfero malsamas, laboras amatorece, supraĵe, burokratisme kaj rutine, naskas teoriajn konfuzojn.

Al tiu ĥaoso partoprenas iufoje ankaŭ homoj iam plenmeritaj. Sen klaraj celoj, pasie apogataj, Esperantujo fariĝas nura Babilonujo kaj Babiladujo de neniofarantoj. El tia komunumo retiriĝas seriozaj homoj, la firmaj karakteroj klarvidantaj, sed nekompreneblaj. Kvazaŭ ĉiuj esperantlingvaj periodaĵoj, iam altspirite batalantaj por Esperanto, emas fariĝi hobiismaj en la falsa espero tiele gajni legantojn. Ĉu en niaj rondoj iu ajn hobia pli efikas ol la **preskaŭ senfina, ege interesa, fascina problemaro de la internacia lingvo**? "Kontakto" proklamas sin nur esperantlingva, sed ne primovada, en iom naiva espero, konkurenci kun mil nacilingvaj hobiismaj revuoj, multe pli fortaj.

Ĉio tio montras perdon de direkto, malfidon al la Esperanta ideo, penetron de komercaj kriterioj en kulturon. Nova laborprogramo de la revuo "Esperanto" celas aperigi "tion, kion la homoj volas legi", samkiel la komercisto vendas tion, kion la homoj volas aĉeti. Nu, la kulturo devas aparteni al ĉiuj, sen esti ĉiesulino; ĝi scias, ke infanoj postulus nur sukeraĵojn, ne lakton kaj fruktojn, la drinkuloj postulas nur alkoholaĵojn kaj tiel pli. La alta ŝarĝo de kulturo konsistas en tio, ke ĝi devas esti vere agrabla sed samtempe **nutraĵo por koroj kaj pensoj**, do, laŭ malnova principo de Horaco, niaj revuoj devas unuigi la agrablan kun la utilo.

Oni diskutadas tro multe hodiaŭ en Esperantujo. Diskutoj estas utilaj, kiel eksperimento sur abstrakta modelo, sed ankaŭ ĉi tie **maksimumo ne signifas optimumon**. Se oni konstatis nur konfuzon en Valencio – kiun utilon tiuj diskutoj havas por simpla Esperantisto? Konklude: mankas la klarvida sistemo kaj kapablo, distingi la ideojn validajn de la nevalidaj. Strategie, tio estas katastrofo. Al senkompara stratego, kiu estis *Lapenna*, oni riproĉas, ke li ne facile akceptis ideojn de aliuloj. Nu, en "Heroldo de Esperanto" n-ro 1 de 2003 oni riproĉas al *Tonkin* "ke li malfacile konsentas, ke oni esprimu malsaman opinion. Li jam montris tion okaze de la traktado de la kongresa temo en Fortalezo". Ĉio klaras, ĉu ne? Oni ne konscias, ke necesas **distingi veron de malvero**, oni kredas ke la diskutoj mem estas la premo de progreso, kvankam mil opinioj kaŭzas nur kakofonion kaj efikas kiel absurda kompasmo montranta la magnetan nordon en ĉiuj direktoj – do nul-valora strategio. Se tiu situacio ne ŝanĝiĝas, havas malmulte da

senco paroli pri engaĝiĝo de la sciencistoj. Oni ne povas konvinki ilin, agadi sub tiaj premisoj, kaj **ni havas la movadon, kiun ni meritas**. Ĉu ni povas likvidi tian situacion? En si mem, eĉ genia ideo estas nur fantomo, ĝi ne havas almenaŭ la forton de kaporalo.

Nia ŝarĝo estas grandega, ĉar ni devas ankoraŭ venki tradiciajn antaŭjuĝojn kaj strukturojn, individuajn kaj ŝtatajn interesojn ktp. La historiistoj de la Renesanco asertas, ke por transiri de mezepoko al moderna mondo, la **historio bezonis titanojn, kaj ĝi kreis titanojn**. Eble nia ŝarĝo ne bezonas ĝuste titanojn, sed ĝi certe bezonas multe pli ol ĝi hodiaŭ havas. Nia movado bezonas novan spiriton en sia tuta agado; espereble niaj diskutoj en "Strategia Forumo" enfokusigos tiun esencan spiriton kaj poste ni vere aktivos, ĉar nenio atingeblas se hodiaŭ oni planas kaj morgaŭ dormos, dume iuj homoj, nekonsciante pri la komplikeco de la ŝarĝo kaj pri netaŭgeco de organizo, kulpigas la ideon mem, dubas pri ĝiaj rolo kaj ŝancoj.

Kion la sciencistoj povus konkrete fari por kontribui al necesa turnopunkto?

Antaŭ ĉio: supere organiziĝi. Ĉi-momente, kun kelkaj esceptoj de supre menciitaj forumoj – la sciencistoj agadas unuope; ili estas partizanoj, liberpafistoj aŭ, kun franca vorto, *franc-tireurs*. Tiaj gerilanoj ne atingas grandajn celojn, ĉar mankas la supera efiko, sen sistemo kun multaj komponantoj, tial bone organizita grupo pli efikas ol granda sed ĥaosa amaso. En ĉefverko, kiu estas "Esperanto en perspektivo", oni povas vidi, ke unuopa agado de sciencistoj estis karakteriza por la komencaj fazoj de la Esperanto-agado. Tiutempe oni faris, ekzemple, prelegvojaĝojn. Tiuj vojaĝoj ne restis senefikaj, precipe tiuj de bulgaro *Krestanov*, de ĉeĥo *Pitlik*, de la renoma svizo *Privat*, la usonano *Parrish* kaj aliaj pli ol 20 intelektuloj, se oni nombras nur la plej notindajn. Post la Dua mondmilito, *Lapenna* ekz. vizitis ĉirkaŭ 150 urbojn de Italio, Francio, Belgio, Nederlando, Britio, Islando, kaj aliaj landoj. Mi citas la unuan frazon de lia libro "**Elektitaj paroladoj kaj prelegoj** (*Rotterdam*, 1966, p.7). "Dum preskaŭ tri jardekoj de aktiva partopreno en la disvastigo de la Internacia Lingvo, mi faris plurajn centojn da paroladoj kaj prelegoj – ĉu en Esperanto pri diversaj temoj, ĉu en kelkaj naciaj lingvoj pri tiu aŭ alia aspekto de la lingva problemoj kaj pri la solvo, kiun donas Esperanto". Tiuj du tipaj prelegoj ne estas ĉio, sed ili estas la plej grava elpaŝo. La progreso de la movado do estis rezulto de multaj **pasiaj aktivuloj**,

de veraj "apostoloj". Kiel homoj, ili ne estis seneraraj sanktuloj aŭ fabelaj herooj, sed malnova maksimumo invitas nin "vidi la homojn en ties kreado, ne en ties tusado".

Esencas la fakto, ke **la mondo devas aŭdi el la buŝoj de kleruloj pri kio temas**. Artikoloj en gazetoj, samkiel invitoj al Esperanto-kursoj per afiŝo sur muro havas **informajn funkciojn**; por varbado ili malmultege efikas – precipe hodiaŭ, kiam la malfacila antaŭenirado de Esperanto denove ŝajnas atesti pri neebbla entrepreno. La ĵurnaloj skribas pri sensacioj, la politikistoj plej ofte pretas je kompromiso kun la estanta ordo. **Novaj kaj veraj ideoj estas serĉendaj kaj trov-eblas en la scienco**.

La spertoj montras, ke per akademia stilo dum diskutoj en universitataj kaj aliaj sciencaj rondoj kaj per racia argumentado, Esperanto gajnas multajn amikojn: **niajn veraĵojn certe kapablas kompreni ne nur la hodiaŭaj esperantistoj**. Per tiaj elpaŝoj naskiĝis kvazaŭ paradoksaj gravaj atingajoj eĉ sub diktaturoj, dume **sen** tiaj altnivelaj engaĝiĝoj malmulte estis atingita en demokratiaj landoj. Per tiaj elpaŝoj la movado multe progresis dum "malvarma milito", sen ili ĝi stagnadas hodiaŭ. Kion faris la unuopuloj dum la pasinteco, ne nepre estas por ni agadmodelo **sed nur provo, ke tiu vojo estas ebla kaj sukcesa**.

Psiĥologia veraĵo avertas, ke "ne estas la samo se du diras la samon". Ju pli grava la parolanto, des pli "vera" la eldiraĵo. Tial oni mortigas personecojn, por neniigi veraĵojn kaj konfuzi vojojn. ISAE celas levi sur altan nivelon la iamajn sukcesajn spertojn per scienca praktika agado en opini-gvidantaj medioj. Ni pretas aŭskulti viajn sugestojn ĉi-rilate. La movado, ĝiaj organizaĵoj kaj la Sciencaj Forumoj kunlaboru por trovi malgrandan iniciatan grupon de sciencistoj, kiuj studu la sugestojn rilate al la organizaj formoj de nia intelektularo kaj prenu en proprajn manojn la rolon de la scienco ene de la Esperanto-movado. Neniu skeptikismo havas lokon ĉi tie, alikaze la movado restas en la nuna senelirejo, bolas en propra supo kaj oni prave kulpigos nin, ke, vivante en eburturo, ni faras nur kabinetan scienccon.

Jen miaopinie kelkaj eblaj elpaŝoj. Sen intenco revolucii la mondon, sed nur plifortigi la rolon de Esperanto en scienco kaj kulturo, ni kreu prestiĝan **Internacian Komitaton por Translima Komunikado**, fronte kun honora prezidanto, kun aganta prezidanto, vicprezidantoj, sekretarioj. Al ĝi apartenu volontulaj sciencistoj, ne multaj,

por ke ĝi estu dinamika; sed ĝi havu sufiĉe multajn kunlaborantojn en diversaj regionoj. Por AIS-iniciato oni trovis en multaj landoj kelkcentojn da Esperantoparolantoj. Hodiaŭ la aktiva kerno de AIS ankoraŭ unufoje atestas pri la bonega efiko de tiu vojo, kiu jam estas supera formo de sciencista engaĝiĝo.

La konkretajn agadojn estigu la komitato mem – kaj la praktiko. Nia opinio, laŭ sporadaj spertoj, la laborprogramo povus eventuale enteni jenajn erojn:

1. Kune kun landaj kaj fakaj asocioj, kiuj preparos la vojojn en propra lando (temas, komence, ne pri landoj kiel Usono, Germanio, Britio, Francio k.s.) la sciencistoj el najbaraj landoj (sed ne nur), prelegu esperantlingve, en la nomo de la Internacia Komitato, pri fakaj problemoj en universitataj kaj aliaj sciencistaj rondoj, kompreneble kun kvalifikita simultana traduko. Pluraj landoj en Orient-Eŭropo organizas tiajn prelegojn diverslingvajn. Post tiaj prelegoj kutime okazas demandoj pri Esperanto ĝenerale, iufoje prelegoj pri Esperanto en iu nacia lingvo, intervjuoj en landaj amasmedioj kaj personaj kontaktoj kun gvidantoj de sciencistaj forumoj, kun junaj esploristoj kaj gestudentoj. Ni kvazaŭ ĉiuj venis per hazardo en kontakto kun Esperanto – kial ne **organizi tiun "hazardon"**?

2. Reprezentantoj de la Komitato povas verki en propra lando, okaze de Universala Kongreso en tiu lando, mallongan dokumenton pri la grava kultura aranĝo esperantlingva. Kun la helpo de patrona personeco tiu dokumento aperu en gazetoj kaj fariĝu larĝe konata, eventuale diskutata en diversaj rondoj. Nuntempe la kongresoj apenaŭ gajnas novajn esperantistojn en la kongreslandoj, la ĵurnalistoj konservas la proprajn falsajn ideojn pri Esperanto. Do, la elspezoj kaj laboroj por UK-oj estas grandegaj – sed "la montoj naskas mokindan muson"! Eĉ en metropoloj malmultaj homoj aŭdis pri Esperanto – kaj kiom da ili fakte komprenis, ke temas pri **ilia propra afero**? Ĉu ne estas rompenda tiu nesukcesa tradicio?

3. Oni reagu science kaj prestiĝe en nacilingvaj amasmedioj al diversaj falsaj opinioj pri Esperanto faritaj (eble sincere, ĉar neinformite) de politikistoj aŭ aliaj personecoj. La **nunaj ironioj, supraĵaj teoriaj asertoj, per kiuj hodiaŭ kutime oni reagis en esperantlingvaj ĵurnaloj, havas nenian pozitivan efikon**. La esperantistoj legas en tiuj reagoj konatajn faktojn, dum la koncernaj personecoj eĉ ne ekscias pri tiaj reagoj, aŭ primokas ilin kaj eble fariĝas eĉ pli gran-

daj malŝatantoj de Esperanto. Kontraŭe, **ni uzu tiajn okazojn por evidentigi niajn veraĵojn**, kaj ni rememoru, ke iufoje honestaj personecoj sincere deklaris, ke "nur nun" ili vere komprenis la sencon de la Esperanto-agado.

4. En la sama scienca spirito, la Komitato reagu (per kompetentaj anoj) en esperantlingvaj ĵurnaloj al diversaj fakaj tezoj aperantaj en Esperantujo. La aŭtoroj de tiaj tezoj povas esti bonintencaj, sed objektive ili damaĝas la movadon, ĉar kulturrevuo kaj ĝiaj artikoloj ĝuas kredemon antaŭ simplaj esperantistoj, kaj tiuj ĉi restas kun malfermita buŝo kiam ili legas, ke Esperanto ne taŭgas kiel dua lingvo, ĝi estas apenaŭ lernebla, la homoj ne volas Esperanton, ĝi ne havas amikecan rolon, la movado estas nura hobbio, ĝi atingis certan disvastiĝon kaj nun – same kiel la estaĵoj – ĉesis plue kreski, kaj eble formortos. Al kio utilas tiaj falsaj tezoj, neantaj jam delonge pravigitajn principojn de nia movado? Ĉu ne estus pli salutinde se la kulturitaj aŭtoroj estus verkintaj verajn kontribuojn al nia kulturo?

5. Sen preni la rolon de organizanto de diversaj sciencaj kaj kulturaj hodiaŭaj forumoj – Balta Forumo, Danuba Forumo ktp. – kiuj malfacile agadas en diversaj regionoj, la Komitato povus roli kiel **konsultanto** de tiuj organizaĵoj. Kune kun tiaj forumoj oni povus ankaŭ helpi al niaj junaj sciencistoj aŭ al gestudentoj supere kvalifikiĝi per dokortitoloj, laŭ la samaj vojoj, per kiuj nacilingvaj sciencistoj el Eŭropa Unio helpas al junaj esploristoj el diversaj landoj. Kelkaj fondaĵoj (ekz. la Fondaĵo *Lapenna*), donas stipendiojn; tion povas fari ankaŭ aliaj internaciaj instancoj sendepende de tio, ĉu la koncerna junulo estas aŭ ne estas Esperantoparolanto.

Kiel jam menciite, temas ĉi tie nur pri kelkaj sugestoj. Sed la praktiko montros multajn aliajn solvendajn problemojn kaj necesajn farenadaĵojn. Eble ankaŭ la Akademio de Esperanto (AdE) ricevus stimulojn por daŭre plenumi siajn funkciojn, respondi eĉ provizore lingvajn demandojn. AdE povas mobilizi aŭtorojn por kunlabori al verkado de gravaj kulturaĵoj, similaj al PIV. Por tiuj diversaj novaj agadoj, kiuj konsistigus nur parton de pormovadaj agadoj, UEA devas aktivigi kaj mobilizi siajn strukturojn. Ĝi devas ankaŭ disponigi de tempo al tempo iom da spaco en la revuo "Esperanto", kie la Komitato prezentu sian starpunkton en iu aktuala problemo aŭ aperigu organizajn kaj mobilizajn materialojn.

Per komunaj agadoj de niaj konsciaj fortoj, ni povos krei la necesan turnopunkton en la movado. D-ro *Corsetti* pravas, asertante ke nur

etan efikon povas havi nia vorto antaŭ naciaj kaj internaciaj instancoj se la movado estas malgranda. Ni redonu al la movado la iaman entuziasmon! Du homkategorioj kapablas je entuziasmo kaj povos decidi la estontecon de Esperanto: la junularo kaj la sindonemaj homoj karakterplenaj. La financoj venos poste: **ne kiel motoro, sed kiel konsekvenco kaj necesa rimedo**. Sed por tio, UEA firme direktu sin al klaraj celoj, ĉar neniŭ vento estas bona por kapitano kiu ne scias al kiu marbordo li alvenu. Ĝi fariĝu pli enhavoriĉa, pli atenta al sugestoj, malpli burokrata, pli batalanta, malpli hobiisma.

Jen do tio, kion la movado kaj la scienco **povas kaj devas** fari unu por la alia. Ni pretas aŭskulti ankaŭ aliajn opiniojn. La ĝisnunaj diskutoj entenas sufiĉe da raciaj ideoj. La grava manko estas **la nefar-emo**. Kial tiom da homoj, fidelaj al nia ideo, povas resti senfaraj? Ni memoru, ke en Julio 1985 aperis gravega dokumento **Centjara Jubileo de Esperanto**, renkonte al la jubilea jaro 1987. Redaktita de *André Staas*, en la nomo de la Internacia Komitato por la Jubilea Jaro. Tiu dokumento entenis **centojn** da ideoj, komence kun invito-proponoj por la patronoj de la Komitato (inter ili la reĝo de Hispanio), kaj de naciaj patronaj komitatoj ĝis kongresoj, festivaloj, sciencaj simpozioj, agadoj ĉe UNESCO, agadoj ĉe parlamentoj kaj aliaj instancoj, kulturaj okazaĵoj, kursoj, lernejoj, projektoj, multaj agadoj de la landaj kaj fakaj asocioj kaj tiel plu. Kio estis realigita el tiu Dokumento? Ĝi entenis ankaŭ prelegvojaĝojn de eminentuloj, kaj plurajn agadojn en universitatoj kaj altlernejoj. Se nur dekonono de tiuj sugestoj estus realigitaj, kun la iamaj firmeco kaj entuziasmo, la Jubilea Jaro ne estus troviĝinta en la malkreska periodo de nia movado. La movado havas multajn necesajn kaj bone elpensitajn sugestojn. **Mankas nur la homoj, kiuj efektivas tiujn sugestojn kaj analizas la rezultojn por plibonigi la efikon.** Ĉu la Esperanto-movado havas ankoraŭ tiajn homojn?

Adreso de la aŭtoro

Prof. Dr. Ignat F. BOCIORT
Wustrowerstrasse 1
DE - 13051 - Berlin / Germanio

Priaŭtoro informo

Profesoro pri filozofio, nelacigebla batalanto por la Internacia Lingvo kaj ties apliko en kulturo kaj scienco.

Praĉeloj kaj klonado

Gabór LÁZÁR

Enkonduko

Laŭ studo de Tutlanda Sanitara Instituto en Usono, la **praĉeloj** (*stem cells*) havas gravan rolon en kuracado de malsanoj, en kiuj substituo estas la celo de la detruitaj ĉeloj. Tiuj malsanoj estas la parkinsona malsano, diabeto, ĥronikaj kormalsanoj, renmalsanoj, hepata insuficienco kaj kancero.

La praĉeloj havas **hematopoezan efikon**, kiun oni aplikadas ekde multaj jaroj okaze de ostmedola transplantado, ĉar la ostmedolo estas riĉa je hematopoezaj praĉeloj. La praĉeloj, kiuj devenas el embrioj estas en la blastuloj okaze de dividiĝo de la fekundigita ovoĉelo.

Praĉeloj estas **plurpotencaj ĉeloj**, el kiuj devenas ĉiuj ĉeltipoj de la organismo. Hodiaŭ estas eble bredi la praĉelojn de nediferenca stadio en laboratorioj ĉirkonstancoj ekde 1981. Tiel en la laboratorioj eblas trovi miliardojn da praĉeloj. Ĉar tiuj praĉeloj estas nediferencaj, la scienculoj esperas, ke ili povas transformiĝi en ajnan ĉeltipon, sekve tiuj povas kompletigi la detruitajn histojn en la homa organismo.

Adoltaj kaj embriaj praĉeloj

Nuntempe estas akraj diskutoj rilate al homa aplikado de **embriodevenaj praĉeloj**. Laŭ la opinio de Usona Scienca Akademio la metodo neniigas la embrion, kaj tiuj ne povas evolui en homan estaĵon, ĉar la homa vivo komenciĝas en la momento de la koncipiĝo. La laboratorioj akiras la embriojn okaze de artefaritaj fekundigoj kaj la superflujajn embriojn ili forĵetas.

Dum daŭras la eksperimentoj kun embriodevenaj praĉeloj, la esploristoj okupiĝas pri **adoltaj praĉeloj**, kiuj estas troveblaj kiel nediferencaj ĉeloj en la histoj, ekz. en la ostomedolo, sango, sangovazoj,